Fine ĝi iris al la muro, pensante, ke la muro estas pli fortan, ol la vento. Sed la muro ankaŭ diris : " Via familio ĉiam min mordadas, kaj mi ne povas tion haltigi."

Jen ĝi komprenis, ke ratino nur devas edzinigi kun rato, kaj reveninte hejmen, ĝi edzinigis sian filinon kun junia rato de sia najbareco.

K. KAJIWARA.

Nubo, cloud.

INFANA VERSAJO.

Eta Manjo Flindre
Sidis intercindre,
Etajn piedsingrojn ŝi varmigis.

 Sin vidis patrineto,
 Punigis filineto,
 Car ŝi la novajn vestojn malpurigis.

JOHN ELLIS, el "The British Esperantist."

Cindro, cinder, ash ; *singro*, singer.

LA DOMO DE JAK'.

Jen estas la domo konstruita de Jak'.

Jen estas la greno, kiu restis en la domo konstruita de Jak'.

Jen estas la rato, kiu manĝis la grenon, kiu restis, k.t.p.

Jen estas la kato, kiu mortigis la raton, kiu manĝis, k.t.p.

Jen estas la hundo, kiu turmentis la katon, kiu mortigis, k.t.p.

Jen estas la bovino kun kurba korno, kiu jetis la hundon, kiu turmentis, k.t.p.

Jen estas tut sola la virgulino, kiu melkis la bovinon, kiu jetis, k.t.p.

Jen estas la viro, ĉifone vestita, kiu kisis la virgulinon & tut solan, kiu melkis, k.t.p.

Jen estas la preĝisto, tute razita, kiu edzigis la viron, ĉifone vestitan, kiu kisis, k.t.p.

Jen estas la koko, matene kriinta, kiu vekis la preĝiston, tute razitan, kiu edzigis, k.t.p.

Jen estas la farmomastro, grene semanta, kiu posedis la kokon, matene kriintan, kiu, k.t.p., k.t.p.

El "The Esperantist."

Rato, rat ; *kato*, cat ; *kurba*, curved ; *korno*, horn ; *sola*, alone, solitary ; *melki*, to milk (milk is *lakto*) ; *ĉifono*, rag ; *farmi*, to farm, take on lease ; *semi*, to sow seed ; *posedi*, to possess.

EZOPA FABELO.

Unū azeno trovis leonan felon. Gi ricevis la ideon vesti sur sin la felon, kaj ŝajnigante sin leono, terurigi la homojn kaj bestojn. Pensite, farite. La azeno ŝajnis esti potenca leono.

La unua viva estaĵo, kiun ĝi renkontis, estis malrica sed talenta komercisto, portanta kelkajn komercajojn sur sia dorso. Li teruriĝis vidante la leonon, kio tre amuzis la azenon. Nun la azeno, intencante pligrandigi la efikon, ekblekis :—ia,—ia,—ia,... Sed jen nia komercisto rekonis la azenon per ĝia voĉo, kaptis ĝin kaj devigis ĝin—vendi malkarege la leonan felon.

El "Lingro Internacia."

Azeno, ass ; felo, hide ; ŝajni, to seem to be ; komerci, to trade ; dorso, back ; intenci, to intend ; bleki, to cry (like an animal) ; kara, dear ; potenca, powerful.

PROVERBOJ.

Eco homara estas eraro. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras.

Por riĉulo fasto, por malriĉulo festo.

Mezuri laŭ sia mero.

Kia la semo, tia la rikolto.

Riĉigas ne enspezo, sed prudenta elspezo.

Kun kiu vi festas, tia vi estas.

Ju pli da juroj, des pli da suspekto.

Korvo al korvo okulon ne pikas.

En infano vidigas, kia homo fariĝos.

Unufoje ŝtelinta restas ĉiam ŝtelisto.

Kapo estas por tio, ke ĝi zorgu pri ĝio.

Belaj rakontoj el trans la montoj.

M. F. ZAMENHOF.

Fasto, fast ; mezuri, to measure ; rikolto, harvest ; enspezo, income ; elspezo, outlay ; juro, oath ; suspekto, suspicion ; korvo, raven ; piki, to stab.

LIZI, ELZE, ELIZABET.

El Hungaraj Rakontoj.

Mi amis nur mia patrinon kaj Lizi, krome neniu en la tutaj mondoj.

Kun ŝi, kun Lizi, mi jam ligis amikecon, kiam mia malgranda fratino mortis je angino.

Tiam fariĝis tre silentaj en nia domo. Malantaŭe ĉirkaŭ la ĉevalstalo bruis ja la knaboj poste kiel antaŭe, sed al la loĝejo ili proksimiĝis nur sur la piedpintoj. Ili ne volis ĝeni la nigre vestitan virinon, kiu senĉese, kvazaŭ senspirite, la funebraln ĉambrojn trapaŝis; de frua mateno ĝis malfrua vespero, en pensojn profundiginta, ŝi travagis la loĝejon, senripoze kiel la pendolo de l' horloĝo, kvazaŭ ŝi eterne iuنجion serĉas. Iafoje ŝi malfermis la ŝrankojn kaj tirkestojn laŭ vico. Tiam mi ĉiam vidis en ŝia mano malgrandajn infanorojn, ŝuojn kaj antaŭtukojn, kiujn ŝi longe rigardis kaj karesis, por ilin denove remeti kun la pupoj, la skribkajeroj kaj ĉiuj aliaj objektoj, kiuj iam apartenis al mia malgranda fratino.

Pri mi ŝi tute ne okupiĝis—ŝi nun pli amis la mortinton, ol ĉiujn vivantojn—kaj tamen mi ĉiam ŝteliris post ŝi. Se mi iaoje ŝian robon ekprenis, aŭ ŝian brakon karesis, por ke ŝi min nur rimarku, ŝi ekrigardis min indiferente per siaj karaj, de nokta plorado lacaj okuloj, aŭ diris: "Kion vi volas, Janko? Ĉu mi devas doni al vi oranĝojn?"

Si tiam eltiris la tirkeston, kie la oranĝoj kuſis, kaj lasis min elekti, kiom mi volis. Kaj mi tute ne volis oranĝojn, mi nur estis jalusa je mia malgranda, mortinta fratino.

FERENC HERCZEG.

Ligi, to bind; *angino*, quinsy; *stalo*, stable, stall; *pinto*, point; *geni*, to trouble, disturb; *funebro*, mourning; *pendolo*, pendulum; *šranko*, cupboard; *tirkesto*, drawer; *vico*, turn; *antaŭtuko*, apron; *luca*, weary; *jalusa*, jealous.

VENTEGA NOKTO.

El Nord-germanaj Rakontoj.

La ventego kriegis kaj bruegis dum la malluma nokto kaj blovege pelis la foliojn antau si. Kia sonado estis en la aero ! De malproksime venas la ventego, el la regiono, kie estas la altaj montoj kaj la granda akvo, el la malvarma nordo. Ĉio, kion ĝi ekkaptas dumvoje, devas kunflugi. Ĝi pelas la foliojn aten, tiel ke ili kirle flugas kaj en sia timo saltas unu super la alia. Jen ĝi permesas al ili dum momento rekonsciigi, ili opinias, ke nun ĉesis la sovaĝa pelado, ke ili povas trunkile malleviĝi teren—jen la sovaĝulo ree ekkaptas ilin kaj la ludo denove komenciĝas. Nun ĝi estas en la torfejo ; tie ĝi trovas nenion kiu kio ĝi povus petoli ; tiam ĝi atakas pluvnubon kiu jus volis ekpluvi—pušegas en ĝian flankon, ĝis ĝi tuj disflugas. Jen la blovulo venas en la arbaron kaj furiozas inter la arboj, kiuj ĝemas kaj krakas. Ankoraŭ salton, kaj nun ĝi estas ĉe la lerneja domo, kiu staras kaŝite en arbetaĵoj inter la du vilaĝoj. Ho, kiel ĝi ĝojkriegas ekvidante la malnovan kadukan domon ! Tie ĝi mi devas enigi ! Per ĉiuj pordoj ĝi bruegas kaj skuas ilin, provante malfermegi ilin. Sed vane. Eĉ ne la lignan kovrilon de la truo en la fronteno ĝi povas deſiri, kvankam la rustigintaj hokoj preskaŭ ne plu povas teni ĝin. Sed almenaŭ ĝi klakas kaj frapegas per ĝi tiom, ke la edzino de la instruisto veziĝas.

HEINRICH BANDLOW.

Nordo, north ; *kirli*, to whisk, to twirl ; *konsciij*, to be conscious ; *opiniij*, to be of opinion ; *torfo*, peat ; *petoli*, to play, tease ; *furiozi*, to rage ; *ĝemi*, to groan ; *kraki*, to crack, crackle ; *kaduka*, decayed, infirm ; *skui*, to shake ; *vane*, in vain ; *frontono*, gable, fronton ; *rusti*, to rust ; *hoko*, hook ; *klaki*, to clack, clap.

EN PIRIN.

El Bulgaraj Rakontoj.

Klime perdis la vojon, la blovegoj estis kovrintaj ĉion : valojn, montetojn, vojojn, kampojn. Li eliris hieraŭ ĝe bona vetero el la vilaĝo, kaj nun ?... Dum tutaj horoj li vagadis en Pirin-monto kaj li ne scias, kie li troviĝas, kien li iras, kion li renkontos. Li komprenis nur unu : ke malproksime, malproksime li estas de sia vilaĝo, en nekonataj montaj dezertoj, en la regno de l' sovaĝaj bestoj kaj de la pereo...

Subite li ekvidis tra la krepusko multajn nigrain ombojn, kiuj iris senbrue sur la neĝo. Kio estas tio ĉi ? Ĉu lupoj ? Ili estas tutaj aro kaj venas de la dekstra flanko ; ili bojas... Li ekkuregas. La malsata aro rapide lin sekvas kun sovaĝaj bojoj... Kiom da tempo li kuris, li ne memoras... Antaŭ li ĉiam nudajo, ĉiam dezerto, ĉiam neĝa kampo. Subite Klime vidas, ke antaŭe ekmoviĝas io, lumaj punktoj brilas kaj lin renkontas : la bestaro elsendis kelkajn lupojn por fermi lian iradon... Klime vidis teruran, neeviteblan morton... Tiam li ree ekkuregis kiel frenezulo maldekstren, al nova direkto, sur ia krutajo malsupren, kaj post li la lupoj... Li dufoje implikiĝis je sia skarpo, kiu trenis, kaj li ekfalis. Troviĝinte en la valo, Klime ĝoje vidis, ke li eniras en ian vilaĝon... Kia ĝi estas, ĉu pomaka*, ĉu kristana, — li ne pensas, ĉar la luparo lin persekutas ĉe tien ĉi. Gi iras post liaj kalkanoj... Li ensoviĝis en ian pordegon, kiun, versajne, la ventego malfermis, kaj li alkuris al la fenestro, kiu lumis. Kaj la lupoj ankaŭ kuras post li. Klime ŝovis malgentile la pordon kaj eniris en nekonatan domon. Li ekĝemis : li vidis bulgaran, kristanan domon, kaj la sanktfigurujon, kaj antaŭ ĝi la sanktlampeton... la

* "Pomako" estas bulgaro fariĝinta mahometano.

flamo malklare brilejis kaj estingiĝis ankoraŭ. El la krepusko eliris iaj homoj. Li ĉirkaŭrigardis mirege. Kie li trovigas?

Subite Klime ekscias, ke li estas en sia hejmo.

La Ĉiopovanto estis direktinta liajn vagadojn al lia vilago, al lia domo, kiam li pensis, ke li iras en tute malsaman direkton.

IVAN MINÈEV.

Klime, man's name ; *blorego*, storm ; *ralo*, valley ; *soraĝa*, wild ; *krepusko*, twilight ; *boji*, to bark ; *nuda*, bare ; *punkto*, point ; *eviti*, to avoid ; *frenza*, crazy ; *impliki*, to entangle ; *skarpo*, scarf ; *persekuti*, to follow in order to harm ; *sori*, to shove, push ; *veratjue*, apparently ; *estigi*, to extinguish.

SOMERA PLUVADO.

El *Proto et Danaj-Norvegaj Aŭtoroj*.

Estis premante varmege, la aero vibris pro varmo, kaj krom tio estis tiel kvieta, nenio alia sin movis, ol la kokeinejo tie sur la urtikoj, kaj kelke da velkitaj folioj, kiuj kuŝis sur la herbo kaj kurbigis sin kun etaj ekmovojoj, kvazaŭ kuntiritaj de la sunaj radioj.

Kaj tiu homo sub la kverko, li kuŝis spiregante kaj melankolie, senespere li rigardis supren al la ĉielo. Li kantetis iom, kaj cedis, fajfis per la bušo kaj cedis ankaŭ je tio, turnis kaj returnis sin, rigardis malnovan talpan teraltajeton, kiu tute helgriziĝis pro sekeco. Subite eta, ronda, nigra makulo vidigiĝis sur la griza tero, ankoraŭ unu, du, tri, kvar, multaj, ankoraŭ pliaj, la tutaj altajetoj fariĝis malhelgriza. La aero estas nur longaj, malhelaj strekoj, la folioj kliniĝis kaj balanciĝis, sibleto, plilaŭtiĝante ĝis siblego, sonis, — akvo fluegis teren.

Cio brilejis, fajretis, kraketis. Folioj, branĉoj, trunkoj, ĉio brilis de akvajo, ĉiu guteto falanta teren, herben, ŝonen, ĉien, disrompiĝis kaj dissprucis en milojn da etaj perloj. Malgrandaj gutoj pendis tie

iom da tempo kaj fariĝis grandaj gutoj, malsuprenfalisa tien ĉi, unniĝis kun aliaj gutoj, formis fluetojn, malaperis en sulketojn, entfuis grandajn truojn kaj eltfuis malgrandajn, forkondukis polvon, lignajetojn kaj foliopecojn, fiksigis sur rifojn kaj denove liberiĝis, turnigis kaj ree surriĝis. Foliojn, ne estintajn kune de la tempo, kiam ili estis burĝonoj, kolektis la akvaĵo; musko, neniiĝita de sekeco, ekstremis kaj fariĝis mola, ĉifa, verda kaj sukplexa; kaj simo, kiu preskaŭ fariĝis polvo, disvastiĝis en graciaj makuloj, kun brilo kiel silko. La konvolvoloj lasis plenigitajn blankajn kalikojn ĝis la rando, interpuŝis ilin kaj versis la akvon sur la kapojn de l' urtikoj. La dikaj, nigraj arbarlimakoj afablege rampis antaŭen kaj rigardis danke la ĉielon.

Kaj la homo? La nudkapa homo staris meze en la pluvo, lasante la gutojn sibli en harojn, brovojn, okulojn, nazon, bušon, kraketis per la fingroj je la pluvo, iom levis iafoje la piedojn, kvazaŭ li intencis danci, ekskuis iam kaj iam sian kapon, kiam tro multe da akvo estis en la haroj, plengorĝe kantis senpripensante tion, kion li kantis, tiel plene la pluvado lin okupis.

J. P. JAKOBSEN.

Vibri, to vibrate; *kokeinelo*, ladybird; *urtiko*, nettle; *velki*, to wither; *fajfi*, to whistle; *talpo*, mole; *streko*, streak; *klini*, bend; *sibli*, to hiss; *spuci*, to spurt, to gush; *sulko*, furrow; *truo*, hole; *rifo*, reef; *burĝono*, bud; *musko*, moss; *seli*, to swell; *ĉifi*, to crinkle, crumple; *simo*, mildew, mould; *gracia*, graceful; *konvololo*, convolvulus; *kaliko*, chalice, calyx; *limako*, slug; *broro*, brow; *nuda*, bare.

KION NE KOMPREENAS LA HIRUNDOJ KAJ PAPILIOJ.

El *Pola Antologio*.

... Iom pli malproksime kuſis flava grenkampo. Malalta barilo apartigis ĝin de l' konstruaĵoj kaj de l' malgranda placeto antaŭ ili.

La barilo formis angulon kaj en la loko, kie kuniĝis du ĝiaj oblikvaj duonoj, ĝi havis pordegon, altan, largan kaj en tiu momento tute malfermitan.

Ni proksimiĝis al la malalta barilo. Anjo ne havis ankoraŭ sufice da tempo por apogi al ĝi sian ombrelon kaj jam en la flava domo oni malfermis la pordon kaj viro starigis ĉe la sojlo kaj laŭte demandis :

— Ĉu vi iras eksterlandon ?

Ni komprenis. La barilo, malzorge konstruita el kurabaj bastonoj, estis io pli grava, ol limo de kampara propraĵo ..

Ci tiu barilo apartigis du naciojn, du landojn, du civilizaciojn.

La sekalo, kreskanta post ĝi, estis jam germana sekalo ; la cejanoj, kiuj, kiel bluaj lumetoj, bruleatis inter la spikoj, estis jam germanaj cejanoj.

Germana estis ĉe la vento, fluganta de tie kune kun la miela odoro de l' konvolvoloj...

Kompreneble, Anjo devis rifuzi al si la riĉigon de sia bukedo per germanaj floroj kaj si tuj sciigis pri ĝi la laŭte demandantan viron.

Li reiĝis domon trankviliĝinta, sed sendube dek kelkaj paroj da viglaj, kvankam nevideblaj okuloj observis ĉiujn-niajn movojn.

Kun stranga sento ni komencis rigardi ĉirkaŭe.

— Kial ? — demandis Anjo, large malfermantante la okulojn — sekve la spiko, kiu elkreskis tie ĉi el grajno alportita de tie de la vento, estas nia, sed milionoj da aliaj spikoj, ĝiaj fratoj, estas fremdaj nur tial, ke ili kreskas unu paſon pli malproksime ?

Mi penis klarigi al si, ke tio ĉi estas tute natura, eĉ necesega.

— Por kiu ?

Anstataŭ respondo mi levis la ŝultrojn.

Okupataj de la penso pri la divido, ni turnis la okulojn al la ĉielo, serĉante ankaŭ sur ĝi liman linion.

Sed la ĉielo estis nur unu, nedividita.

Ni rigardis la sunon.

Ankaŭ la suno estis nur unu, nedividita.

En la sama momento papilio, kiu sidis proksime de ni sur la barilo kaj jen etendis, jen altiris siajn rugajn flugiletojn kun argenta subajo, rapide levigis kaj transflugis al la germana flanko.

Gi longe flirtis tie super la balanciĝantaj spikoj kaj trovinte amikon aŭ amikinon ankoraŭ pli trankvile revenis.

Samtempe kelke da hirundoj, antaŭsentante proksimigon de fulmotondro, komencis kun laŭta pepado rondflugi malproksimen kaj senpune trans la limon...

— Vi vidas! — ekkriis Anjo kun infana triumfo. — La hirundoj kaj papilioj ne konsentas la “necesacon,” pri kiu vi tiel sage parolis.

Či tiuj senkonsideraj vortoj malĝojigis min.

— Ah, Anjo, Anjo! — diris mi riproče, — ĉu vi forgesis, ke la homo estas pli sage kreitajo, ol la flirtemaj birdoj kaj papilioj senpripensaj?...

WIKTOR GOMULICKI.

Greno, corn; placio, place, square; apogi, to lean on; ombrello, umbrella, parasol; sojlo, threshold; laŭta, loud; sekalo, rye; cejano, corn bluebottle; mielo, honey; buketo, bouquet; paro, pair; spiko, ear of corn; linio, line; papilio, butterfly; flerti, flutter, wave; fulmo, lightning; tondro, thunder; pipi, to chirp.

PRINTEMPO VENOS.

Se la naturo rigidigas
De prem' de l' vintro frostiganta,
Se tute per la neĝ' kovrigas
Je longe tero ekdormanta,
Amiko kara! vi ne ploru:
Printempo venos kaj somero,
Ke la naturo ree floru,
Ke verdu, reviviĝu tero.

A. NAUMANN.

LA VOJO.

Tra densa mallumo briletas la celo,
 Al kiu kurage ni iras.
 Simile al stelo en nokta ĉielo,
 Al ni la direkton ĝi diras.
 Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj
 Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj
 Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
 Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kurage, kaj ne flankiĝante
 Ni iru la vojon celitan !
 Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
 Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino, kaj la pacienco--
 Jen estas la signoj, per kies potenco
 Ni pašo post pašo, post longa laboro,
 Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
 Pri l' tempoj estontaj pensante.
 Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,—
 Ni semas kaj semas konstante.
 "Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas,—
 "Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas :
 "Obstine antaŭen ! La nepoj vin benos,
 Se vi pacience eltenos."

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
 Velkantajn foliojn deſiras,
 Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
 Ni forton pli freſan akiras.
 Ne mortos jam nia bravega anaro,
 Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
 Obstine ĝi paſas, provita, hardita,
 Al cel' unu fojon signita !

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankigante
 Ni iru la vojon celitan !
 Eĉ guto malgranda, konstante frapaante,
 Traboras la montojn granitan.
 I' espero, i' obstino, kaj la pacienco—
 Jen estas la signoj, per kies potenco
 Ni paſo post paſo, post longa laboro,
 Atingos la celon en gloro.

L. ZAMENHOF, el "Fundamenta Krestomatio."

Celo, aim; *simile*, like; *phantomo*, phantom, apparition;
sorco, fate; *moko*, mockery; *elekti*, to choose; *flanko*, side;
guto, drop; *frapi*, to strike; *bori*, to bore; *signo*, sign;
atingi, to attain; *laca*, weary; *semo*, seed; *cesi*, to cease;
admoni, to exhort; *koro*, heart; *rento*, wind; *subita*, sudden;
velki, to wither; *desiri*, to tear from, pluck off; *akiri*, to
 acquire; *prori*, to make trial of; *hardi*, to harden.

EL LA PAROLO DE D-RO. L. L. ZAMENHOF.

EN LA CUILDHALL, URBO LONDONO,

La 21an de Aŭgusto, 1907.

. . . La dua kulpigo, kiun ni ofte devas atendi,
 estas tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj.
 Ĉar tiuj esperantistoj, kiuj traktas la esperantismon
 kiel ideon, predikas reciprokan justecon kaj fratecon
 inter la popoloj kaj ĉar la opinio de la gentaj
 ŝovinistoj patriotismo konsistas en malamo kontraŭ
 ĉio, kio ne estas nia, tial ni laŭ ilia opinio estas
 malbonaj patriotoj, kaj ili diras, ke la esperantistoj
 ne amas sian patrujon. Kontraŭ tiu ĉi mensoga,
 malnobla kaj kalumnia kulpigo ni protestas plej
 energie, ni protestas per ĉiuj fibroj de nia koro! . . .

Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo,
 mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi,
 kvankam mi forlasis vin kiel junu knabo. Vi, kiun

mi ofte vidas en miaj songoj, vi, kiun nenia alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas : ĉu mi, idea esperantisto, kiu revis pri frateco inter ĉiuj viaj loĝantoj, kvankam mi devis bedaŭrinde forlasi vin, simile al multaj centoj da miloj da aliaj viaj filoj—au ĉu tiuj personoj, kiu(j) deziras, ke vi apartenu nur al ili, kaj ĉiuj aliaj viaj filoj estu rigardataj kiel fremduloj au sklavoj ! Ho patriotismo, patriotismo, kiam fine la homoj lernos kompreni ĝuste vian sencon ! Kiam via sankta nomo ĉesos esti armilo en la manoj de diversaj malhonestuloj ! Kiam fine ĉiu homo ricevos la rajton kaj la eblon algluigi per sia tuta koro al tiu peco da tero, kiu lin naskis !

Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si, elſiri la patrujon unuj al la aliaj, perforte altrudi al si reciproke siajn lingvojn kaj morojn, ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiu(j) ilin ĉiujn egale atakas. Kaj kune kaj interkonsente ili celados ĉiuj al unu vero, al unu feliĉo. Kaj se iam venos tiu feliĉa tempo, ĝi estos la frukto de konstanta kaj senlaeca laborado de tiuj homoj, kiu(j) vi vidas nun en ĉi tiu ĉambrego kaj kies nomo, ankoraŭ tre malmulte konata kaj tre malmulte ŝatata, estas "esperantistoj."

El "The British Esperantist."

Kulpo, fault ; *trakti*, to treat ; *prediki*, to preach ; *gento*, tribe, race ; *sorinisto*, Chauvinist ; *Litorujo*, Lithuania ; *songo*, dream ; *atesti*, to bear witness ; *retri*, to imagine, dream ; *bedaŭri*, to regret ; *sklavo*, slave ; *senco*, meaning ; *rajto*, right ; *algliui*, to glue to, stick to, attach ; *lupo*, wolf ; *trudi*, to obtrude ; *moro*, manners, custom ; *paco*, peace ; *konsenti*, to agree ; *kruda*, crude, rough, raw ; *frukto*, fruit ; *ŝati*, to prize, appreciate, like.

FOREWORD TO SUPPLEMENTARY VOCABULARY.

As this Vocabulary is intended for those who have worked through the preceding lessons, it is not a full vocabulary, but only supplementary to those already given, and the words contained in those are, as a rule, not repeated here.

In order to get in as many root words as possible, derived words and the second word of a pair (*e.g.*, male or female, opposites, the action and the tool, the animal and its young, etc.) are generally omitted; the simple word or one of the pair being found, the other word is to be formed from it by means of the proper word-ending, prefix or suffix.

In English there are often several words to express the same or nearly the same meaning. Want of space prevents these being all included; the most important or most commonly used word has therefore been chosen; for instance, *mercury*, *tranquil*, *diaphanous*, *suffocate*, *salve*, *renown*, *fiddle*, are not to be found, but *quicksilver*, *calm*, *translucent*, *smother*, *ointment*, *fame*, *violin*, are there.

A most valuable help to the student is a good English dictionary, and if this gives the derivation of the words, the interest of the study is greatly increased. The difficulty often is, not to find the right Esperanto word, but to know exactly what the English word or phrase means. It is the experience of most Esperantists that in learning Esperanto their knowledge of their own language has become much

more thorough.¹ For this reason and also that this language cannot be learned simply as a matter of rote, but demands the exercise of the thinking and reasoning powers,² Esperanto ought to be taught in all schools.

¹ A remark made by a student during one lesson was "Well, if we don't learn Esperanto, we shall learn English."

² To convince an opponent or a doubter of this, tell him that "utila" means "useful," and "mal" denotes the contrary; then ask what "malutila" means. The answer will almost certainly be "useless." Then show that the contrary of a good quality is not merely the absence of that quality, but is a bad quality, and therefore the contrary of "useful" is "harmful."

VOCABULARY

A

abbot, abato.
 abdomen, ventro.
 ability, kapablo, povo, lerteco
 talento.
 able (to be), povि.
 abolish, nenigi, forigi.
 abomination, abomeno.
 abroad, eksterlande.
 absent (to be), foresti.
 absolve, senkulpigi, senpekigi.
 absorb, absorbi ; sorbi.
 abstain, deteni sin.
 abuse, insult'i, -o ; trouzi ; mal-
 bonuzi.
 abyss, abismo, profundegajo.
 accent, akcent'i, -o ; super-
 signo.
 accept, akcepti, alpreni.
 accident, malfeličajo, okazo.
 account, kalkulo ; rakonto ;
 konto. on—of, pro.
 accuse, kulpigi, akuzi.
 ace, aso.
 ache, dolor'o, -i.
 acknowledge, konfesi.
 acorn, glano.
 acquaint, sciigi.
 acquainted, become—with, kon-
 atigi kun.
 acquire, akiri, atingi
 acquit, senkulpigi.
 acrid, akra, morda, pika.

act, ag'i, -o ; far'i, -o ; lego;
 akto.
 action, agado ; (*law*) proceso
 active, agema, aktiva.
 actor, aktoro.
 actual, nuna, efektiva.
 adapt, alfari.
 add, aldoni, kunmeti, sumigi.
 address, alparoli al ; sin turu
 al ; (*letters*) adresi.
 adhere, aliĝi, algluiĝi al.
 adjourn, prokrasti.
 admit, allasi, konfesi.
 adopt, alpreni, fil (-in) -igi.
 adore, adori, amegi.
 adult, plenkresk'a, plenaĝ'a.
 adulterate, falsi.
 adultery, adulto.
 advantage, utilo, profito
 bonajo.
 advertise, anonci, reklami.
 advice, konsilo.
 affair, afero.
 effected (to be), asekti.
 affiliate, aliĝi, filiiĝi.
 afternoon, posttagmezo.
 again, re-, ree, denove.
 agenda, tagordo, programo.
 agent, agento.
 agile, facilmova.
 agitate, agiti.
 agony, dolorego, (*death--*)
 agonio.
 agree, konsenti, interkonsenti.

agreeable, afabla, agrabla.	annual, ĉiujara.
agreement, kontrakto, inter-konsento.	annul, nuligi.
agriculture, terkulturo.	anoint, sanktolei, ŝmiri.
aim, cel'o, -i.	anonymous, anonima, sennoma
air, aero, aerumi; mieno; ario.	ant, formiko.
aisle, flankajo.	anthem, antemo.
alarm, maltrankviligi; alarmo.	anvil, amboso.
alder, alno.	anxious, maltrankvila.
alert, vigla.	apathetic, apatia.
alien, alilandulo, eksterlandulo.	aperture, malfermajo, aperturo.
alike, simila, egala.	apologise, peti pardonon.
alive, vivanta, viva.	apparatus, aparato.
alleviate, plidolčigi, malpliigi.	appeal, alvoki; (<i>law</i>) apelacio.
allow, permesi.	appear, aperi; ŝajni.
allowance, porcio; (^a , ^c) rabato; dekalkulo.	appearance, vidigo; sajne; mieno.
allude, aludi.	appetite, apetito.
almanac, almanako, kalendaro.	applaud, aplaŭdi.
almighty, ĉiopova.	apply, almeti; sin turni al.
almond, migdalo.	appoint, nomi, difini.
alms, almozo.	appreciate, ŝati.
alone, sola.	approach, alproksimiĝi.
along, laŭlonge.	approve, aprobi.
aloud, laŭte, voĉe.	apricot, abrikoto.
alternate, alterni.	apron, antaŭtuko.
amazement, mirego.	arable, plugebla, semotaunga.
amber, sukceño.	arbitrary, arbitra.
ambition, ambicio.	arbitration, arbitracio.
ambush, embusko.	arbour, laŭbo.
amiable, afabla, aminda.	arch, arko; arkelleksi.
amputate, detranĉi, amputi.	argue, argumenti.
amuse, amuzi.	arithmetic, aritmetiko.
anarchy, anarhio.	arm, brako, -pit, akselo, armo.
ancestors, praavoj, prapatroj.	arms, armiloj, bataliloj.
ancient, antikva.	aroma, aromo.
anecdote, anekdoto.	arouse, veki.
angel, angelo.	arrange, arangi.
angle, angulo; fiŝi.	arrest, aresti.
animal, besto.	arrive, alveni.
ankle, maleolo.	arrogant, aroganta.
anniversary, datreveno.	arrow, sago.
announce, anoncei.	art, arto.
annoy, ĉagreni, ĝeni.	artery, arterio.
	artful, ruza.

artichoke, artišoko.
 article, artikolo, komercajo.
 artificial, artefarita, arta.
 artifice, artifiko.
 artisan, metiisto.
 artist, artisto.
 ascertain, konstati.
 ash, cindro, (*tree*) frakseno.
 ask, demandi. -for, peti.
 asparagus, asparago.
 aspect, aspekto, vidiĝo, fazo.
 aspen, tremolo.
 ass, azeno.
 assemble, kunveni, kunvoki.
 assert, aserti, konstati.
 assign, asigni.
 assure, certigi; asekuri.
 astonish, mirigi. (*to be -ed*).
 miri.
 astringent, adstringa.
 astute, sagaca.
 asylum, rifugejo, azilo.
 athletic, atletta.
 atmosphere, atmosfero.
 atom, atomo.
 attach, alligi, kunigi.
 attain, atingi, trafi.
 attempt, provi; (*criminal*)
 atenco.
 attention, atento, (*pay—*) atenti.
 attitude, sintenado.
 attract, altiri, logi.
 auction, aukcio.
 audit, kontkontroli.
 author, aŭtoro.
 authority, rajto, aŭtoritato.
 avalanche, lavango.
 avaricious, avara.
 avenue, aleo.
 average, meznombro, meza-
 kvanto.
 avert, deturni.
 avoid, eviti.
 award, aljuĝi

axis, akso.
 axle, akso.
 azure, lazuro.

B

baboon, paviano.
 baby, infaneto.
 bachelor, fraŭlo.
 back, dorso, posta flanko.
 backbone, spino.
 bacon, lardo.
 bag, sako.
 bait, allogajo.
 bake, baki.
 balance, ekilibri; (*of account*)
 restajo. -sheet, bilanco.
 balcony, balkono.
 ball, (*play*) pilko, (*cannon*)
 kuglo, (*dance*) balo.
 balloon, aerostato.
 ballot, balotii, -o.
 balsam, balzamo.
 band, ligilo; bando; orkestro.
 bandage, bandaĝi.
 banish, ekzili. [digo.
 bank, (*money*) banko; bordo,
 banker, bankiero.
 bankrupt, bankroto.
 banner, flago, standardo.
 banquet, festeno.
 baptism, baptizo.
 bar, bar'i, -ilo; busedo.
 barbarian, barbaro.
 barber, barbiro.
 bare, nuda.
 bargain, marĉandi.
 bark, boji; ŝelo.
 barley, hordeo.
 barrel, barelo. -organ, gurdo.
 barrister, advokato. [nobla.
 base, bazo; fundamento; mal-
 basin, pelvo, kuvo.

basket, korbo.
bat, vespero; batilo.
bath, bano, bankuvo.
bathe, sin bani.
beam, radio, trabo, vekto.
bean, fabo, fazeolo.
bear, urso; porti; subteni.
beard, barbo.
beat, bati, vergi, vipli, venki.
beautiful, bela.
beaver, kastoro.
because, ĉar, tial ke; pro tio ke.
bed, lito, kušejo, fluejo, florbedo.
bee, abelo.
beech, fago.
beer, biero.
beet, beto.
beetle, skarabo, blato.
beg, peti, almozpeti.
begin, komenci, ek-.
behave, konduti.
behold, rigardi; jen!
bell, sonorilo.
below, sube, malsupre.
belt, zono.
bench, benko; (*joiner's*) stablo.
bend, fleks'i, -igi; klin'i, -igi.
bent, kurb'a, -igita.
bequeath, testamenti.
berry, bero.
besiege, sieĝi.
bet, veti.
betray, perfidi.
betrothal, fianc' (-in-) iĝo.
bewitch, sorĉi.
bilberry, mirtelo.
bile, galo. {beko.
bill, kalkulo; kambio; afišo;
billiards, bilardo.
bind, ligi; (*books*) bindi;
 bandagi. {-weed, liano.
birch, betulo.
birth, naskiĝo.
biscuit, biskvito.

bishop, episkopo.
bit, peco; enbušajo.
bite, mordi.
bitter, akra, maldolča.
blackbird, merlo.
blacking, ciro.
bladder, veziko.
blade, kling'; (*of grass*), folieto.
blaspheme, blasfemi.
bless, beni. {teno.
blind, blinda. **window**, rulkur.
blond, blonda.
blood, sango.
blot, makulo.
blow, blovi; bato, frapo.
blouse, bluzo.
blue, blua; -bell, hiacinto,
 kampanoletto.
boa-constrictor, boao.
boast, fanfaroni.
boat, boato.
bobbin, bobeno.
body, korpo.
bog, marĉo.
boil, boli; absceso.
bold, kuraĝa, sentima.
bolt, rigl'i, -ilo; bolto.
bomb, bombo.
bombard, bombardi.
bond, obligacio, garantiajo.
bondage, servuto, sklaveco.
bone, osto.
bonnet, ĉapo.
booth, budo.
border, rand'o, -ajo; borderi.
bore, bori; kalibro.
born (to be), naskiĝi.
borrow, prunte preni.
bosom, brusto, sino.
bottom, fundo, malsupro.
boundary, limo.
bouquet, bukedo.
bow, saluti; kapklini; par-
 arko; arĉo; banto.

ovels, internajo, intestaro.
 owl, pelvo, kuvo.
 ox, kesto, skatolo ; logio ;
 boksi ; pugnobati.
 races, šelko.
 rain, cerbo.
 ran, brano.
 ranch, branĉo ; filio.
 rass, flava kupro, latuno.
 rave, brava, kuraĝa.
 reach, breĉo.
 reak, rompi, frakasi.
 reakfast, matenmanĝ'i, -o.
 reast, brusto, maimo.
 reathe, spiri.
 ribe, subaĉeti.
 tick, briko.
 ridge, ponto.
 idle, brido.
 right, hela, brila, gaja.
 ring, alkonduki, alporti.
 road, larga.
 roker, makleristo, (*act as—*)
 makleri.
 rooch, broĉo.
 rood, kovi, kovitaro.
 roth, buljono.
 rown, bruna.
 rowse, sin paŝti.
 ruse, kontuzi ; pisti
 rush, bros'o, -i ; balailo ;
 peniko.
 racket, sitelo.
 rukle, buko.
 ru, burĝono.
 udget, budĝeto.
 refet, (*restaurant*) busedo.
 ug, cimo.
 uild, konstrui.
 uillet, kuglo.
 ullfinch, pirolo.
 anch, fasketo, aro.
 undle, fasko.
 ngle, fuši.

burden, surpezi, ŝargo.
 bureau, oficejo, kontoro.
 burgess, burĝo.
 burn, brul'i, -igi.
 burrow, kavigi.
 burst, krevi.
 bury, enterigi, enfosi.
 business, afero, okupo, negoco.
 busy, okupata, aferema.
 butcher, buĉ'i, -isto.
 buttercup, ranunkolo.
 butterfly, papilio.
 buzz, zumi.

C

cab, fiakro, kabriolet, droško.
 cabbage, brasiko.
 cabin, kajuto, kabano.
 cabinet, ĉambreto, kabineto.
 cable, ŝurego, kablo.
 cage, kaĝo.
 calico, kalikoto.
 calk, kalfatri. [voki.
 call, voki, (*—together*) kun-
 callosity, kalo.
 calm, kvieta, trankvila.
 camel, kamelo.
 camp, tendaro.
 canary, kanario.
 candid, sincera, verdirema.
 candidate, kandidato, aspiranto.
 cane, kano ; bastono ; vergi.
 cannon, kanono.
 canon, kanoniko.
 canopy, baldakeno.
 canvas, kanvaso.
 cap, ĉapo, (*milit.*) kepo.
 capable, kapabla, kompetenta.
 cape, manteleto ; promontoro,
 terkapo.
 capital, ĉefurbo ; kapitalo ;
 granda litero.

capitalist , kapitalisto.	chance , hazardo ; riski ; okazi
capitulate , kapitulaci.	sanco.
capsize , renversigi.	
captain , ŝipestro, kapitano.	chancellor , kanceliero.
capture , kapti.	change , ŝangi, aliigi.
car , veturilo, ĉaro.	channel , kanalo.
card , karto, -board, kartono.	chaos , haoso.
carnation , dianto ; flavroza.	chapel , kapelo, preĝejeto.
carp , karpo ; kritikaji.	chapter , ĉapitro. [rolo]
carpenter , ĉarpentisto.	character , karaktero ; (drama)
carpet , tapiŝo.	charro , ĉarmi ; talismano.
carriage , veturilo, kalešo, vagono ; transporto.	chaste , ĉasta.
carrot , karoto.	cheat , trompi.
cart , ŝargveturilo.	check , haltigi ; kontroli.
carve , tranĉi ; skulpti. [ceso.]	cheek , vango.
case , okazo ; ujo ; kazo ; pro-	cheerful , gaja.
cashier , kasisto.	cheese , fromago.
cast , jeti, (<i>metal</i>) fandi.	chemist , apotekisto, hemiisto.
castle , kastelo.	cheque , ĉeko.
catch , kapti.	cherry , ĉerizo.
caterpillar , raŭpo.	chess , ŝako. [komodo]
cathedral , katedralo.	chest , brusto ; kesto, (<i>of drawers</i>)
cattle , bruto, brutoj.	chestnut , kaštano, (<i>horse</i> marono).
cauliflower , florbrasiko.	chew , mači, (<i>—cud</i>) remaĉadi.
cause , kaŭz'i, -o ; -igi ; afero.	chicory , cikorio.
caution , averti ; singardemo.	chief , ĉef'o, -a.
cave , kaverno.	chimney , kamentubo.
cavil , ĉikani.	chin , mentono.
caw , graki.	china , porcelano.
ceiling , plafono.	chirp , pepi ; (<i>insects</i>) ĉirpi.
celebrate , festi, soleni.	chisel , ciz'i, -ilo.
celery , celerio.	chocolate , ĉokolado.
cell , ĉelo, ĉambreto.	choir , horo.
cellar , kelo.	choke , sufoki.
censor , cenzuristo.	chop , haki ; koteleto.
censure , riproci.	chronicle , kroniko.
ceremony , ceremonio, soleno.	church , preĝeo.
certain , certa ; kelkaj ; ia.	cigarette , cigaredo.
chaff , grenventumajo.	circle , rondo, cirklo.
chaffinch , fringo.	circular (<i>letter</i>), cirkulero.
chain , ĉeno.	circumference , ĉirkaŭo.
chair , seĝo. -man, prezidanto.	circus , cirko.
chalk , kreto.	city , civito, urbo. [regnante]
	citizen , urbano, burgo, civitano.

ivil, civila, ĝentila.
 ivilize, civilizi.
 laim, pretendi, postuli.
 lap, (*hands*) manfrapi, plaŭdi.
 lass, kurso; (*sort*) klaso.
 lassify, ordigi, klasifiki.
 law, ungego.
 lay, argilo.
 ergyman, pastro. [komizo.
 lerk, oficisto, kontoristo,
 lever, lerta.
 liff, krutajo.
 limate, klimato.
 limb, grimpi, suprenrampi.
 link, tinti.
 loak, mantelo.
 lod, bulo.
 loset, necesejo; ĉambreto.
 loth, drapo; (*a —*) tuko.
 lothe, vesti.
 loud, nubo.
 lover, trifolio.
 lub, klubo, (*cards*) trefo.
 ue, postesigno.
 oal, karbo.
 past, marbordo.
 pat, vesto; -tail, basko.
 ockle, kardio.
 ocoa, kakao; -nut, kokoso.
 od, gado, moruo.
 offee, kafo.
 offin, ĉerko.
 oil, rulajo, volvajo.
 bin, monero.
 oke, koakso.
 olander, kribilo.
 old, malvarm'a, -umo.
 olleague, kolego.
 ollect, kolekti, amasigi.
 ollective, opa.
 ollege, kolegio.
 olony, kolonio.
 olour, koloro.
 omb, kombi; (*fowl's*) kresto

combine, kombin'i, -iĝi, kun'igi, -iĝi.
come, veni.
comfort, komforti, konsoli.
comic, komika, ridinda.
comma, komo.
command, ordoni, komandi.
comment, komentari'i, -o.
commerce, komerco, negoco.
commission, komisi'i, -o; (*sell on—*) makleri.
committee, komitato.
common, komuna, ordinara, vulgara; erikejo, step'o, -eto.
commune, komunumo.
communicate, komuniksi.
companion, kunulo.
company, anaro, kompanio societo, trupo, roto.
compare, kompari.
compartment, fako.
compass, (*mariners'*—) kom-paso; (*drawing*) cirkelo.
compel, devigi.
compensate, kompensi.
compete, konkuri.
complaint, plendi.
complete, plen'a, -igi.
compliment, kompliment'o, -i.
compose, verki; komposti.
composer, kompostisto.
comrade, kamarado. [al.
concern, koncerni; zorgo; rilati.
concrete, konkreta.
concussion, skuego.
condemn, kondamni.
condition, kondiĉo; stato.
condole, kondolenci.
confectioner, konfitisto.
conference, konferenco.
confirm, konfirmi.
confiscate, kontiski.
conflict, konflikto.
conform, konformi.

confuse, konfuzi.
congratulate, gratuli.
congregation, kongregacio.
congress, kongreso.
conjure, jongli.
conscience, konscienco.
conscious, konsci'a, -ness, 'o.
consequence, sekvo.
conservative, konservativa.
consider, pripensi, konsideri.
consistent, konsekvenca.
consonant, konsonanto.
constipation, mallakso.
consult, konsiliği kun.
consume, konsumi.
consumption, (*disease*) ftizo.
contact, kontakto.
contain, enhavi, enteni.
content, kontenta.
continue, daüri, -igi. | -igi.
contract, kontrakti ; kuntir'i,
contrary, kontraño, malo.
contrast, kontrasti.
contrive, elpensi.
control, estri, regi.
convenient, oportuna.
conversation, interparolado,
 konversacio.
convict, kondamnito.
convince, konvinki.
convolvulus, konvolvolo.
convulse, kunvulsio, spasmo
copper, kupro.
copy, kopii ; ekzemplero.
coral, koralo.
cord, šnuro.
core, korajo, internajo.
cork, korko ; štopi.
corn, greno ; (*foot*), kalo.
corner, angulo. | erara.
correct, korekti ; gusta, sen-
correspond, korespondi.
corrode, mordeti.
corset, korseto.

costume, kostumo.
cotton, (*raw*) kotono ; (*manuf.*)
 katuno.
cough, tusi.
council, konsilantaro.
count, kalkuli ; grafo.
country, lando ; kamparo.
courage, kurago.
course, kuro ; kurso. of—,
 kompreneble.
court, korto, (*royal*) kortego
 jugejo ; amindumi.
covetous, avida.
crab, krabo, kankro.
crack, fendi, kraki, krev'i, -igi.
cradle, lulilo.
crafty, ruza.
crane, gruo, šarglevilo.
crape, krepo.
crater, kratero.
cravat, kravato.
creature, estajo, kreitajo.
credit, kredito.
creed, kredo.
creep, rampi.
crest, tufo, kresto.
crevice, fendo.
cricket, grilo ; (*game*) kriketo
crime, krimo.
crippled, kripla.
crisis, krizo.
criticism, kritiko.
crochet, kroceti
crocodile, krokodilo, aligatoro
cross, kruco, trans' -iri, -pasi
 —out, streki.
croup, krupo.
crow, korniko.
crowd, amaso.
crown, krono ; (*of head*) verto.
cruel, kruela.
cruise, krozi.
crumple, čifi.
crust, krusto.

-utch, lambastono.
 -y, krii, ekkrii, plori ; (*of animals*) bleko.
 -ystal, kristalo.
 -ibe, kubo.
 -ickoo, kukolo.
 -icumber, kukumo.
 -iss, manumo ; frapo.
 -ltilvate, kulturi.
 -inning, ruza.
 -ip, taso, kaliko.
 -apboard, ŝranko. [pekli.]
 -ire, resanigi ; (*bacon, etc.*)
 -rious, scivola, stranga, kuri-
 oza.
 -irl, buklo.
 -rrant, ribo, sekvinbereto
 (korinta).
 -rrrent, fluo.
 -rtain, kurteno.
 -rved, kurba, fleksita, nerekta.
 -ishion, kuseno.
 -stomer, kliento.
 -tlet, kotleto.
 -cle, ciklo.
 -clone, ciklono.
 -tar, Caro.

D

-ffodil, narciso.
 -ily, ĉiutaga.
 -inity, frandajo ; frandema ;
 -delikata.
 -isy, lekant'o, -eto.
 -im, digo, akvoštapiro.
 -image, difekti.
 -ince, danc'i, -o ; balo.
 -andelion, leontodo.
 -ire, kuraĝi.
 -orn, fliki.
 -ite, dato ; (*fruit*) daktilo.
 -wn, tagiĝo.

dead, senviva, mortinta. -ly,
 -pereiga.
 dear, kara, multekosta.
 debauch, diboco.
 debris, rub'o, -ajo.
 debt, ŝuldo, (*be in—*) ŝuldi.
 decipher, decifri.
 deck, ferdeko ; ornamo.
 declaration, deklaracio.
 decoration, ornamajo ; ordeno.
 decree, dekreto, mandato.
 decrepit, kaduka.
 dedicate, dediĉi.
 deed, ago, faro, farajo, faritajo ;
 -dokumento.
 deep, profunda ; (*sound*) basa.
 deer, cervo.
 defeat, venki, malvenko.
 defend, defendi.
 defer, prokrasti.
 deficiency, deficit, malsufiĉeco.
 defile, intermonto ; malpurigi.
 define, difini.
 definite, definitiva.
 degenerate, degeneri.
 degree, grad'.
 Deity, Diajo, Dieco.
 delay, prokrasti.
 delegate, deleg'i, -ito.
 delicate, delikata.
 delightful, ĉarma, rava.
 delirium, delir'o, (*be in*) -i.
 deliver, savi, liberigi ; (*goods*)
 liveri.
 deluge, superakvego, deluvo.
 den, nestego, kaverno.
 denounce, denunci.
 deny, nei, malkonfesi.
 depart, foriri.
 department, fako.
 depend, dependi.
 derive, devenigi.
 descendant, ido, posteulo.
 describe, priskribi.

desert , dezerto ; forlasi ; for-	dismal , funebra.
kuri de.	
desk , pupitro.	dismay , konsterni.
despatch , ekspedi, depešo.	dispel , peli, forpelis, dispeli.
dessert , deserto.	dispose , disponi.
destine (tor), disini (por).	disposition , inklinacio, emo.
destroy , detruji.	dispute , disputi, malpacio.
detail , detalo.	dissect , sekci.
detriment , malutilo, perdo.	disseminate , dissemini.
develop , plivastigi, disolv'i,-i,-igi, (<i>phot.</i>) aperigi.	dissolve , solvi.
devil , diablo, demonio.	distance , interspaco, malproksimeco, distanco.
devoted , sindona.	distinct , klara.
devout , pia.	distinguish , distingui.
dew , roso.	distract , distri.
dexterous , lerta.	distribute , disdoni.
dial , ciferplato.	district , regiono, kvartalo, di-
diarrhoea , lakso.	trikto.
dice , ludkuboj.	ditch , foso.
dictate , dikti.	dive , subakvigi.
dictionary , vortaro.	dividends , rento, dividendo.
die , morti.	divorce , eksedzigi.
differ , diferenci.	dizziness , kapturñigo.
diffuse , disvastigi, difuzi.	do , fari.
digest , digesti.	doctor , kuracisto, doktoro.
dignity , digno, rango.	doctrine , doktrino, instruo.
dine , tag', vesper', -manĝi.	domestic , hejma, doma.
dip , trempo, subakvigi.	dose , dozo.
diploma , diplomo.	dot , punkto.
diplomacy , diplomatio.	double , duobl'a, -igi.
direct , direkta, rekta, senpera.	doubt , dubi.
disappoint , seniluziigi, ĉagreni.	dough , knedajo.
discharge , eligi, eksigi, elpagi.	down , lanugo ; malsupre.
disciple , lernanto, disciplo.	dowry , doto.
discipline , disciplino.	drag , treni.
discount , diskonto, rabato.	dragon , drako. -fly , libelo.
discover , eltrovi.	dragoon , dragono.
discreet , diskreta, singardema.	drain , defluilego, senakvigi.
discuss , diskuti.	drake , anaso.
disease , malsano.	drape , drapiri.
disguise , alivesti, maski.	draught , aerfluo. -s (<i>game</i> damoj).
disgust , naŭzi.	draw , desegni ; tiri, (<i>from we</i> cerpi.
dish , plado.	drawer , tirkesto.
dislocate , elartikigi.	

rawers, kalsono, (chest of -s), komodo.	[i.]	edition, eldono.
ream, song'i, -o; (day-), rev'o,		editor, redaktoro.
edge, skrapegi.		educate, eduki.
ress, robo; vesti, sin vesti.		eel, angilo.
till, bori; ekzerco, manovro.		effect, efiko, efekto.
rink, trinki, (<i>to excess</i>) drinki.		effective, efektiva.
tive, veturi; peli. —away, forpeli.		efficacious, efika.
roll, ridinda, ŝerca.		effort, peno, klopodo.
cone, abelviro; zumi.		eiderduck, molanaso.
top, gut'o, -i.		elastic, elast'a, -ajo.
town, dron'i, -igi.		elbow, kubuto.
ug, drogo.		elder (tree), sambuko.
um, tamburo.		elect, elekti, baloti.
unken, ebria.		electricity, elektro.
ty, seka. —land, firmajo.		elegant, eleganta.
ick, anasino, anaso.		elf, koboldo, elso.
ration, daŭro.		elm, ulmo.
ity, devo, (<i>tax</i>) imposto.		eloquent, elokventa.
be on—, dejori.		embalm, balzami.
well, loĝi, restadi.		embrace, ĉirkaŭpreni, embraki; igi; ampleksi.
te, tinturi.		embroider, brodi.
ke, digo.		emerald, smeraldo.
E		
ger, avida.		emigrate, elmigri.
r, orelo, (<i>corn</i>) spiko.		eminent, eminenta.
rl, grafo.		emotion, kortušeco.
rly, fru'a, -e.		emphasis, emfazo, akcentego.
rn, perlabori. [vora.		empire, imperio.
rnest, serioza, diligentia, ter-		enable, ebligi.
eth, tero. —quake, tertremo.		enamel, emajl'o, -i.
rthenware, fajenco.		enchant, ravi; ensorĉi.
st, oriento.		encore, bis.
ster, Pasko.		endeavour, klopodi, peni.
ony, ebono.		endow, doti.
clesiastical, eklezia.		endure, daŭri; toleri, suferi.
ho, echo, resonadi.		energy, energio.
ge, rando, tranĉrando, bordo.		engine, mašino, lokomotivo, motoro.
ity, edifi.		engrave, gravuri.
it, redakti.		enjoy, ĝui.
		enlist, varbi, rekruti.
		enough, sufici, (<i>be —</i>) sufici.
		entangle, impliki.
		enterprise, entrepreno.

entertain, amuzi ; regali.
enthusiasm, entuziasmo.
entice, logi, allogi.
entwine, kunplekti.
envelop, envolvi.
envelope, koverto.
environs, ĉirkaŭajo.
equivalent, ekvivalenta, egala.
erase, trastreki ; forsfroti.
erect, vertikala ; rekta ; starigi.
errand, komisio.
escape, forkuri, forsaviĝi.
establish, fondi, starigi.
estate. (*land*) bieno.
esteem, estimi.
estimate, taksi.
eternal, eterna, ĉiama.
ethical, etika.
eve, antaŭtago.
even, eĉ ; parnombra ; ebena.
event, okazo.
evil, malbono, peko.
exact, ĝusta, preciza ; postuli.
examine, ekzameni, esplori.
examination, ekzameno.
example, ekzemplo.
exceed, superi.
except, krom, esceptinte ;
 escepte.
exchange, interŝangi.
 the ---, Borsa.
excite, eksciti.
exclusive, eksklusiva.
excursion, ekskurso.
execute, efektivigi ; (*— a criminal*)
 ekzekuti.
exercise, ekzerci. **-book**, kajero.
exhaust, konsumi, elcerpi.
exhibition, ekspozicio.
exhort, admoni.
expect, atendi.
expel, elpeli.
experience, sperto.
experiment, eksperimento.

expert, lerta, kompetenta.
explode, eksplod'-i, -igi.
express, esprimi, ekspresso.
extend, etendi.
exterminate, ekstermi.
extinguish, estingi.
extract, ekstrakti, eltiri.
extraordinary, eksterordinara.
eye, okulo. **-brow**, brow
 -lid, palpebro.

F

fable, fablo.
fact, fakteto. **in---**, ja, efektive.
factory, fabrikejo, faktorio.
fade, velki. [ro]
fail, manki ; malprosperi, ban-
 faint, sveni.
fair, foiro ; blonda ; justa.
fairy, feino, feo.
faith, fido, kredo.
falcon, falko.
false, falsa, malvera.
fame, gloro, renomo ; famo.
familiar, kutima, intima.
family, familio.
fan, ventum'i, -ilo.
fare, farti ; veturnpago.
farm, farmi (*have on lease*
 farmobieno).
fashion, modo, maniero, fason.
fast, fast'i, o ; rapida.
fasten, alligi, fiksi.
fat, gras'a, -o ; sebo.
fatal, fatala, mortiga.
fate, sorto.
fathom, sondi, klasto.
fault, kulpo ; difekto ; eraro.
favour, favori, komplezo.
feast, regalo, festeno ; festo.
feather, plumo.
feature, trajto.

feed, nutri, mangigi, pašti.	fit, flirti.
feel, palpi, senti.	float, naġi ; surnagi.
felt, felto.	flock, aro, paštataro, ŝafaro.
female, ino, virinseksa.	flog, skurġi.
tonce, skermi ; palisaro.	flood, superakvegi.
terment, fermenti.	floor, planko, etaĝo.
tern, filiko.	flour, faruno.
terret, časputoro.	flow, flui.
terry-boat, pramo.	flower, flor'o, -i. -bed , bedo.
ester, ulceriġi, pusī.	fluid, fluajo.
festival, festo.	flutter, flugeti, flirti.
feudal, feŭdala.	fly, mušo ; flugi.
tever, febro.	fog, nebulo.
fibre, fibro.	fold, fald'i, -o.
fine, fifro.	follow, sekvi.
fig, figo.	fondle, dorloti, karesi.
night, batal'i, -o.	food, nutrajo.
igure, cifero ; figuro.	fool, malsagulo.
figurative, figura.	foot, piedo; futo. -man , lakeo. -path , trotuaro, piedvojeto.
file, fajli, -ilo.	forage, turaġo.
film, filmo, tavoleto.	forehead, frunto.
filter, filtr'i, -ilo.	foreign, ali', ekster'-landa, fremda.
fin, naġilo.	forest, arbarego.
fine, delikata ; monpuno.	forge, forgi. [zoto.]
fir, abio.	forget, forgesi. -me-not , mio-
fire, brulo, fajro ; (gun) pañi.	forgive, pardoni.
ireplace, kamenos, fajrejo.	formidable, timeginda.
fireworks, artfajrajo.	formulate, formulsi.
firm, firma, fortika ; firmo.	fortress, fortikajo.
fish, fis'o, -i, -kapti.	fortunate, feliċa.
fist, pugno.	foundation, fundamento.
fit, atako. — for , taŭga ; kon-	foundry, fandejo.
vena, deca.	fountain, fontano.
fix, fiksi.	fowl, korbirdo.
flake, floko, neĝero.	fox, vulpo.
dame, flami.	frame, kadro.
flannel, flanelo. [mento.	freckle, lentugo.
flat, plata, ebena ; aparta-	free, liber'a, -igi ; senpaga.
flatter, flati.	freeze, frostiġi, glaci'igi, -igi.
avour, gusto.	frequent, ofta ; vizitadi.
flax, lino.	fringe, frangō.
fea, pulo.	fritter, fritajo.
flesh, (meat) viando ; karno.	
mint, siliko.	

frock, vesteto. -**coat**, surtuto.
frog, rano.
frolic, petoli.
frown, sulk'o, -igi.
frugal, ūparema.
fruit, frukto. -**ful**, fruktodona.
fry, friti, (*spawn*) frajo. -**ing**
 pan, pato, fritilo.
fuel, bruiajo, hejtajo.
fulfil, plenumi.
fun, ūercado.
function, funkcio.
funeral, enterigiro.
funnel, funelo.
funny, ridinda.
fur, telo ; (-*coat*) pelto.
furnace, fornego.
furnish, mebli, provizi.
furrow, sulko.
further, plie, plimalproksime.
fury, furiozo, furio.
fuse, fandi.
furniture, mebl'o, -aro.
future, estonteco.

G

gadfly, tabano.
gain, gajni, (*clock*) trorapidi.
gall, galoo. -**nut**, gajlo.
gallery, galerio.
gallop, galopi.
game, ludo, časajo.
gap, brečo ; manko.
gargle, gargari.
garrison, garnizon'o, -i.
gas, gaso.
gate, pordego.
gauze, gazo.
gelatine, gelateno.
gem, gemo.
general, ĝeneral'a ; generalo.
generation, generacio.

generous, malavara.
genius, genio, geniulo.
gentle, dolča, nesorta, milda.
gentleman, sinjoro.
genus, gento.
germ, ġermo.
germinate, ġermi.
gesture, gesto.
ghost, fantomo.
giant, giganto.
gild, ori, orumi.
gill (*of fish*), branko. [kuko
gin, ġino.
ginger, zingibro. -**bread**, miel-
gipsy, cigano.
give, doni, donaci.
glacier, glaciejo.
glass, vitro. a—, glaso. look-
 ing—, spegulo.
glaze, glazuri.
glorify, glori.
glove, ganto. [iro
glow, ardi, brili. -**worm**, lamp-
glue, gluo.
glycerine, glicerino.
gnat, kulo.
gnaw, mordeti.
goat, kapro.
goblet, pokalo.
goblin, koboldo.
God, Dio.
gold, oro.
goldfinch, kardelo.
golosh, galos̄.
goodbye, adiaū.
goose, anserino.
gooseberry, groso.
gospel, evangelio.
gout, podagro.
govern, regi.
governess, guvernistino
graceful, gracia.
gradual, grada, laŭgrada.
graft, inokuli, grefti.

H

- grain, grajno, greno.
 grammar, gramatiko.
 grape, vinbero.
 grass, herbo.
 grasshopper, akrido.
 grate, sajrujo ; raspi, skrapi.
 grating, krado.
 gravity, pezo.
 gravy, suko.
 grease, graso ; šmiri.
 great, granda. -coat, palto.
 greedy, avida, mangegema.
 green, verda. -house, varmejo.
 greengage, renklodo.
 grey, griza. -hound, lepor-hundo.
 grill, kradrosti.
 grin, grimaci, rikani.
 grind, mueli ; pisti ; grinci.
 gristle, kartilago.
 groan, gemi.
 grocer, spicisto.
 grotesque, groteska.
 grotto, grotto.
 ground, tero. -floor, teretaĝo.
 groundsel, senecio.
 group, grup'o, -igi.
 rouse, tetro.
 grub, larvo.
 guarantee, garantii.
 guard, gardi, (*mili.*) gvardio.
 gudgeon, gobio.
 guess, diveni, konjekti.
 guide, gvidi.
 guillotine, gilotino.
 gulf, golfo.
 gull, mevo.
 bullet, ezofago, gorĝo, faŭko.
 gum, gumo, dentokarno.
 gun, pafilo, kanono. -powder, pulvo.
 gush, spruci.
 uttapercha, gutaperko.
 utter, defluilo.
- habit, kutimo.
 haddock, eglefino.
 hair, haro, haroj ; hararo.
 -dresser, frizisto.
 hall, vestiblo, halo, salono.
 halt, haldi, lami.
 halter, kolbrido.
 ham, ŝinko.
 hammer, martelo.
 hand, mano. -ful, plenmano.
 -shake, manpremo.
 handkerchief, naztuko.
 handle, tenilo, manpreni.
 hang, pend'i,-igi.
 hansom, kabriolet, fiakro.
 happen, okazi.
 harbour, haveno. [hardi]
 harden, malmoligi, (*health*)
 hare, leporo.
 harm, difekti, malutili.
 harness, jungi, jungajo.
 harpoon, harpuno.
 harrow, erpi, erpilo.
 harvest, rikolto.
 hasten, rapid'i, -igi.
 hatch, kovi.
 hatchet, hakilo.
 haunch, kokso.
 hawk, akcipitro ; kolporti.
 hawthorn, kratago.
 hay, fojno.
 hazelnut, avelo.
 heal, resanigi, cikatrigi.
 health, sano. propose a—, toasti.
 heap, amas'o, -igi.
 heart, koro, (*cards*) kero. by—, parkere.
 hearth, kamenlo, sajrujo, hejmo.
 heath, eriko, erikejo, stepo.
 heathen, idolano.
 heaven, ĉielo.

heavy , peza.	hover , flirty.
hedge , plektobarilo.	hub , radcentro, akso.
erinaco.	hue , nuanco, koloro.
heir , heredanto.	hum , zumi.
hell , infero.	human , homa. -being , homo.
helm , direktilo.	humane , humana.
helmet , kasko.	humble , humila.
hem , borderi.	humbug , blago.
hemp , kanabo.	humming-bird , kolibro.
herald , heroldo.	humorous , humoraja, sprita serca.
hereasy , herezo.	hump , ĝibo.
hermit , ermito.	hunger , malsato.
hero , heroo.	hunt , ĉasi.
heron , ardeo.	hurrah , hura.
herring , haringo.	hurricane , uragano.
hesitate , ŝanceligi, heziti.	hurt , vundi, malutili.
hiccough , singulti.	husk , ŝelo.
hide , kaſi ; felo.	hut , kabano.
